

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIJO

julio - aŭgusto 2005 • numero 76 | volumo 13 - numero 4



Maldekstre:
Kumari —
“*La vivanta diino*” de
Nepalo.
Vidu paĝojn
3-5 por raporto pri
veturo al
Nepalo.

Ankaŭ en ĉi
tiu numero:
Kolektado
de rozoj
(p.6),

Pri la
varano
(p.15),

Filmo-
recenzo
(p.24).

**nova
konkurso**

kaj ankoraŭ
pli...

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Numero 76 • Vol 13.4 • Julio–Aŭgusto 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis preparita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, la programo uzita estas Pages, kaj la tiparoj Futura, Onyx, kaj Tempo (de Franko Luin).

ABONOJ KAJ PASINTAJ NUMEROJ

Membro/Abonprezo: \$A30.00. Pagu al:

Libroservo de AEA

143 Lawson St

Redfern NSW 2016 ŝ Aŭstralio

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *ĜK* kostas A\$3.00+poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas el: <http://www.esperanto.org.au/>

ĜK estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj ĉe la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruc

P. O. Box 643

York WA 6302

Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

sudakruco@westnet.com.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn de AEA aŭ de NZEA.

© 2005 AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La bazan grafikan aspekton de *ĜK* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

MIA VIZITO AL NEPALO (Franciska Toubale).....	3
GRAVA RETADRESSANĜO DE <i>ESK</i>	5
MIA NOVA ŜATOKUPO: SAVADO DE MALNOVAJ ROZOJ (Margaret Furness).....	6
SPECIALA KONKURSO.....	9
LAŬ MIA VIDPUNKTO: DEFENDE DE “NATURALAJ” FORMOJ (János Petik).....	10
TREVOR KAJ KATJA STEELE EN HINDIO (Venkatesh Reddy).....	11
SUKCESIS EN LA EKZAMENOJ.....	11
MORTO DE ALI B. MILANI.....	14
PRI ĈIRKAŬ LA DOMO (Erhard Claus).....	15
ALMEMBRARAJ INFORMOJ ELSTARAJ (Marcel Leereveld).....	16
FOR THE BEGINNER: SOME DIFFERENT THOUGHTS FOR THE BEGINNER (Marcel Leereveld).....	17
TOKI (rakonto de Patricia Grace).....	20
AIDOSO EN AŬSTRALIO (László Farkas).....	23
FILMORECENZO: <i>CIFERUMU “M” POR MURDO</i> (Tony Peterson).....	24
FILM REVIEW: <i>DIAL “M” FOR MURDER</i> (Tony Peterson).....	25
NOVA PETO PRI LA HISTORIO DE ESPERANTO EN AŬSTRALIO.....	27
LA VIZAĜOJ DE BOB FELBY.....	27
AEA ON THE INTERNET.....	28
INTERRETE: ĈU VIN INTERESAS ARTAĴOJ?..	28
OPINIO (Terry Manley).....	28
MELBURNO: LA UNUA SEMINARIO 2005 (Franciska Toubale).....	30

SUR LA KOVRILO

Unu el la plej interesaj faktoj de nia mondo estas la ankoraŭa vivo de antikva folkloro. Nepalo fascinas multajn el ni, kaj nin veturigas tra tiu kurioza lando unu el niaj vojaĝemaj membroj.

MIA VIZITO AL NEPALO

DE FRANCISKA TOUBALE

Malgraŭ la averto de la registaro, ke aŭstralianoj vojaĝu al Nepalo nur pro nepraj kialoj, mi decidis pozitive respondi al la invito de la nepalaj esperantistoj, pensante ke ili certe kapablas juĝi ĉu nia sekureco estas endanĝerigita aŭ ne, kaj atingis Kathmandun la 4an de marto. La ĉeesto de soldatoj kun maŝinpafiloj ĉe la pordo de la flughaveno estis iom timiga, sed la rideto de Franziska Reisel kaj Dhruba, kiuj bonvenigis min, tuj forviŝis miajn pensojn pri maltrankvileco.

Fakte la tiel nomataj Maoistoj ne ricevis rekonon por kandidatiĝi en la baloto de 1994 kaj ne povis realigi siajn celojn: interalie anstataŭigi la monarkion per laika respubliko. Ili komencis kaŝe kaj kontraŭleĝe agi jam de 1995, sed la 13a de februaro 1996 estas konsiderata kiel la komenco de la multnombraj perfortaj atakoj kontraŭ bankoj, bienposedantoj, policanoj, funkciuloj aŭ aktivuloj de aliaj tendencoj. Oni nombras 7500 mortintojn kiel la rezulton de tiuj perfortoj. La 29an de januaro 2003 la reĝo kaj lia registaro konsentis ĉesigi la militon kaj negocii, sed ĝis nun la konflikto ne solviĝis.¹ Ĉe la enirejo kaj elirejo de ĉiuj urboj, soldatoj kontrolas la pasaĝerojn kaj iliajn sakojn. Foje eĉ ne eblas antaŭeniri dum la nokto ĝis la soldatoj remalfermas la barilon en

la mateno. Pro tio la trafiko estas malrapida kaj laciga, sed nur tiun ĝenon mi spertis.

23 eksterlandanoj same kuraĝis ĉeesti la, laŭ la nepalanoj, plej longan kongreson en la historio de esperanto: la 4a Azia Kongreso komenciĝis per Antaŭkongresa Renkontiĝo, de la 4a ĝis la 8a de marto, kaj finiĝos la 29an de aŭgusto. La kongreso mem okazos de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto.



Venis 7 homoj el Pollando, 5 el Islando, 4 el Germanujo, 2 el Japanujo, 2 el Usono, 1 el Ĉinujo, 1 el Svislando, 1 el Aŭstralio, 3 esperantistoj el orienta Nepalo kaj 4 el okcidenta Nepalo. El Kathmandu venis okdek esperantistoj, plejparte junaj studentoj, kies rego de la lingvo estas diversa. Kvankam estis la periodo de la ekzamenoj, ili ĉeestis kiel eble plej multe da eroj de la programo.

¹ Laŭ la informoj de S.D. Muni en la libro *Maoista Ribelo en Nepalo, la defio kaj la respondo* (*Maoist Insurgency in Nepal, the Challenge and the Response*).

La malfermo de la renkontiĝo, kies honora gasto estis reprezentanto de la Ĉefa Oficejo pri Turismo, kiu poste invitis nin viziti muzeon pri la diversaj gentoj kaj iliaj tradicioj en Nepalo, komenciĝis per ekflamigo de kandeloj ĉirkaŭ statuo de diino. Okazis prelegoj pri Nepalo, esperanto en Nepalo, la nepala lingvo kaj pri neordinara planto *Cordicep sinensis*, laŭ la latina nomo. Novbakita esperantistino, Apsana, klarigis ke ĝia vivo dependas de raŭpo. Ĝi fortigas la imunon sistemon kaj pro tio estas tre valora por kuraci aidoson.

Ankaŭ eksterlandanoj prelegis: Lusi Harmon pri la usona instrumetodo *Pasporto al la Tuta Mondo* kaj Andrzej Grzebowski pri Monda Turismo kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo.

Ni vizitis multajn templojn kaj palacojn en aŭ apud Kathmandu, en Patan, Paŝupatinath, Budhanath, Ŝajambu, Basantapur kaj Bhaktapur. Bedaŭrinde la skulptaĵoj foje malaperas pro la multnombraj kolomboj. En Basantapur la *Kumari*, vivanta diino, montris sin al ni en siaj riĉaj vestoj ĉe la fenestro de sia palaco. Fariĝas *Kumari* la junulino kiu posedas la diversajn petitajn kvalitojn, inter alie tiun, kiu, malgraŭ ŝia juna aĝo ne timas monstrojn. Tiam ŝi kaj ŝiaj gepatroj translokiĝas al palaco, kie ĉio estas provizita por ili, ĝis la unua menstruo de la *Kumari*. La plenkreskuloj kaj infanoj, kiuj apud la temploj provas vendi sian varon al la turistoj por sin vivteni, lernis kelkajn frazojn en esperanto kun granda amuzo.

Post la renkontiĝo okazis ekskurso al la nacia parko Ĉituan. Ĝi estas konsiderata de UNESKO monda naturheredaĵo ekde 1984. Ni atingis ĝin parte buse, parte per flosado sur la foje tre trankvila, foje rapidflua rivero Trisuli. La kamparanoj, kiuj kultivas la flankon de la montoj, kaj iliaj familianoj, ne havante ponton, uzas kvazaŭ-kaĝojn, kiuj glitas sur ŝnuroj por transiri la riveron aŭ transporti siajn produktojn. En la parko ni tranoktis sur senelektra insulo, ĉirkaŭita de rivero en kiu estas laŭdire krokodiloj. La celo estis vidi sovaĝajn bestojn, kiaj tigroj, hienoj, leopardoj, promenantante, aŭ sur la dorso de elefanto, aŭ piede. Bedaŭrinde dum nia restado la bestoj ne abundis. Ni sukcesis vidi diversajn birdojn, simiojn kaj rinocerojn.



De Parko Ĉituan, ni iris al Pokhara, ĉe la piedo de la montaro Anapurna. Tie valoras ellitiĝi frue por admiri sunleviĝon. Tiam la neĝo de la inter 6000 kaj 7000 metrojn altaj montoj fariĝas ora. Tiu urbo estas la deirpunkto de multaj piedgrimpadaj

Bonvenigis nin per ruĝo sur la frunto kaj flora kolĉeno granda grupo de esperantistoj, kiu atendis nin en la hotelo. Okazis solena kunveno kaj dancoj laŭ la nepala tradicio.

Pro tio ke ni restis iom pli longe ol la plejparto de la eksterlandanoj, Jon Eliason el Islando kaj mi, akompanataj de juna nepala esperantisto Kanchan, piediris kun dorsosakoj ĝis Nagarkot, vilaĝo, kiu situas sur la pinto de 2200-metrojn alta monto oriente de Kathmandu. La malgrandaj kampoj en teraso sur la flankoj de la montoj aspektas kiel verdaj flav-kolora artaĵo. Kvankam ne eblas uzi maŝinojn, la terpomoj, la tritiko kaj olenapoj kreskas en rektaj linioj kun spaco por akvoprovizado, tute sen trudherboj. Ni trapasis multe da lernejoj kaj multe da junuloj, kiuj studis sidante aŭ kuŝante sur la grundo apud la kamparaj domoj. Mi ne tre ŝatis kiam la infanoj insiste sekvis nin esperante akiri fruktojn aŭ bombonojn. Tio estas indiko

ke multe da turistoj sekvas tiun vojon. Bedaŭrinde gesto de amikeco ŝanĝis la infanojn en almozetantojn. De la supra la vido de ĉiuj ĉirkaŭaj valoj kun la neĝkovritaj montoj ĉe la fundo estas mirinda, aparte dum la sunsubiro aŭ leviĝo.



Finfine pro la malgranda nombro de ĉeestantoj, en tiu renkonto kreiĝis amikeca kaj familieca etoso. Estis eble konstante paroli kun la nepalaj esperantistoj kaj lerni pri iliaj vivkondiĉoj. Ili estas gastamaj, entuziasmaj esperantistoj kaj atendas vian viziton. □

GRAVA RETADRES-ŜANĜO DE ESK

Ekde la mezo de majo, *ESK* havas novan retadreson:

sudakruco@optusnet.com.au

Ĉar la malnova retadreso de *ESK* ne plu funkcias, ni petas ĉiujn skribantojn uzi nur la novan retadreson por ni.

La retadreso de la redaktoro ankaŭ ŝanĝiĝis, kaj nun estas:

donbroadribb@optusnet.com.au

kaj ni petas ĉiujn personajn komunikaĵojn per la reto sendi al tiu nova adreso, ĉar la malnova ne plu funkcias.

MIA NOVA ŜATOKUPO: SAVADO DE MALNOVAJ ROZOJ

DE MARGARET FURNESS



Grimpanta ruĝa rozo preskaŭ venkita de surgreftita rozo

Kio estas malnova rozo? Estas kelkaj difinoj, sed plej simple: roz-specio aŭ -vario unue vendita antaŭ almenaŭ jarcento. Alia inkludas rozojn ĝis la dua mondmilito, do Hibrid-Musk-rozojn, kaj la produktaĵojn de aŭstralia bredisto Alister Clark (plej bone konata pro *Lorraine Lee*, *Black Boy*, *Sunny South*.)

Ĉiuj rozoj originis en la norda hemisfero. Jam en la fruaj jaroj de la aŭstraliaj kolonioj, S-ro Macarthur kaj aliaj alportis rozarbustojn, por provi forpeli hejmsopiron. Iu malkovris, ke se oni ŝovis la subon de branĉeto de rozo en terpomon, ĝi povis travivi longan vojaĝojn. Oni ankoraŭ trovas malnovajn arbustojn kreskantajn senhelpe en tombejoj, apud vojoj, aŭ ĉirkaŭ domruinoj. La serĉado de malnovaj rozoj (en Texas

nomata “rose rustling”), por ilin “savi” per stikado kaj plantado de idoj aliloke, estas kaj ŝatokupo kaj internacia movado. Speciale en orminadaj regionoj, kaj antaŭaj havenoj de velŝipoj, ekz Bermudo, oni trovas multajn variojn kiuj aŭ perdis la nomon aŭ ne plu troviĝas en Anglio, kies vintro ne taŭgas al *Te-rozoj*.



Te-rozo *Marie van Houtte*

Ĉu necesas ilin savi? Jes, kaj rapide (Ne temas pri la trudherboj *R. canina* (**dog rose**) kaj *R. eglanteria* (**sweetbriar**); ternetigemuloj forfosas ilin el tombejoj kaj ĝardenoj de detruotaj domoj, aŭ ŝpruc-

venenas ilin apudvoje. La originaj plantoj de kelkaj miaj trovitaĵoj jam malaperis. Greftitaj rozoj povas esti estingitaj per ŝosoj el la baztrunko. Alia danĝero estas la emo de ĝardenistoj, ĉiam deziri ion pli modernan, aŭ rozarbuston, kiu floras de printempo ĝis la komenco de vintro. La plej multaj rozspecioj, kaj “Malnovaj Eŭropaj” rozvarioj, floras nur printempe. Pli longa rozflorado alvenis al Eŭropo ĉefe per bredado kun rozoj el Ĉinio kaj poste Japanio, ekde la frua 19a jarcento. Ĉefe Te-rozoj floras dum la tuta jaro.

Ĉu savindaj? Jes ja. Multaj estas pli fortikaj ol modernaj rozoj, kaj bezonas malpli (aŭ preskaŭ neniom) da akvumado, ŝprucado, eltranĉado — miaspecaj rozoj! Multaj kapablas aŭ preferas kres-



Gallica rozo Charles de Mills apudvoje

ski per la propraj radikoj, anstataŭ esti greftitaj; do la ĝardenisto ne riskas fremdajn ŝosojn el la baztrunko. La formoj de malnovaj rozoj estas tre diversaj; pluraj rozbredistoj, ekzemple David Austin, nun provas kopii ilin, ĉar la sameco de Hibridaj Te-rozoj enuigas. Variado de petalkoloro estas neniel nova; Ĉinaj rozoj (ekz. *Mutabilis*) malheliĝas dum ili pliaĝas, kaj multaj Te-rozoj est-



Grimpanta rozo *Excelsa* kovras tombon en kampara tombejo.

as buntaj. Unu tia havas ĉinan nomon, kiu signifas “rozkolora karmo plej belas en ora pelvo”. Kaj la parfumo! Ege multaj malhavas, kompare al modernaj rozoj. La plej amataj estas Damask-rozoj, kiujn oni uzis por parfumoj kaj medicinoj jam de la romimperia epoko, kaj Hybrid-Perpetual-rozoj. Parfumo aŭ formo de malnova rozo memorigas onin pri la ĝardeno de la avino aŭ pentraĵoj el aliaj jarcentoj.

Al nekonata vario kutime estas donata studnomo laŭ la unua loko, kie ĝi estis trovita, +/- iom da priskribo. Ekzemploj estas *Montrose Tea ROR* (“renamed old rose”), kaj *Octavius Weld ROR* (laŭ la nomo sur la apuda tombo). Mi ofte sendas foton aŭ skanitan bildon al rozamikoj interrete, petante helpon pri nomoj.

Ŝosoj kreskas el radikoj apud kelkaj rozarbustoj, (Gallica-rozoj ofte tiel agas), kaj oni povas elfosi plantetojn sen difekti la originan. Por savi aliajn mi provas stiki — planti tranĉetojn en la grundon en majo aŭ frua vintro; aŭ en



Ĉina-rozarbusto *Cramoisi Superieur*
sur tombo

ofte akvumatajn ujojn alimonate. Nepras peti permeson de la posedanto, aŭ la zorganto de la tombejo, kaj neniam el-ĉerpi aŭ forfosi la originan planton. Ofte la posedanto scias iom pri la historio de la rozo, aŭ de la regiono; tiel oni aŭdas tre interesajn rakontojn.

Kie vidi arojn da malnovaj rozoj? Ĝenerale, en urbaj botanikaj ĝardenoj. *En NSK:* Tombejo Rookwood havas, mirinde, 200 variojn nekonatajn aliloke; Bishop's Lodge ĉe Hay. *Viktorio:* La Viktoria Provinca Roz-Ĝardeno. *Kanbero:* Ĝardenoj de la Malnova Parlamentejo. *SA:* Apud la Rivero Torrens; Tombejoj Mitcham kaj Blakiston, Carrick Hill. *Okcidenta Aŭstralio:* Araluen, Pinjarra.



Te-rozo *Princesse de Sagan*

Internacia Kongreso pri Heredaĵ-rozoj okazos en Dunedin en Decembro.

Kion legi? Komence, *My World of Old Roses* de Trevor Griffiths.

Mi daŭre vagas laŭ kamparaj vojetoj, kaj hantas tombejojn...

Vidindaj retejoj:


www.countrysideroses.com

www.vintagegardens.com

www.rossroses.com.au □



Nekonata Hibrid-Perpetual-Rozo



RADIO 3ZZZ

Nia aŭstralia Esperanto radio-programo

Ĉiam aŭdebla per Interreto

Kvankam la nombro da esperantlingvaj radioprogramoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskultebblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe www.3zzz.com.au. La vario de la enhavo — muziko, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturaĵoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Kaj la lingvonivelo estas alta. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiusemajne. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — plus la senpaga komputilprogramo *RealPlayer* (elŝutebla ĉe www.real.com).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman esperantolandeton!

SPECIALA KONKURSO

Ĝuste repondu la demandon:

kiu dato tuj sekvis la 12an de oktobro 1582?

Ĉi tiu estas serioza konkurso rilatanta al paradokso.

Sendu vian respondon al *ENK* antaŭ la 16a de aŭgusto 2005 al la adreso:

sudakruco@optusnet.com.au

aŭ al la adreso de la redaktoro: PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

Nur abonantoj kaj membroj rajtas partopreni en la konkurso.

Ĉiu ĝuste respondinta abonanto ricevos libropremieton elektitan de la redaktoro.

☝ • laŭ mia vidpunkto

DEFENDE DE “NATURAJ” FORMOJ

DE JÁNOS PETIK

Dank’ al la toleremo kaj komprenemo de la redaktoro de *EPK*, mi scipovis ankaŭ (iom enŝtele) tuŝi du modif-proponojn al la tradicia esperanto-gramatiko (nome: se tio necesas, ni uzu “un” aŭ ion alian por nedifina artikolo, anstataŭ “iu”; kaj ni prononcu ekz. “nacio”-n *lnáciol*/*lnácjol* anstataŭ *lnáciol*).

Ankaŭ plu konvinkita, ke esperanto estas kreaĵo multe pli grandioza (kaj sekve ĝia pozicio pli stabila) ol ke ĉi tiaj kritikoj povus ŝanceli ĝian pozicion, mi opinias tion oportuna daŭrigi la “kritikadon” koncize prezentante 2 el la 3 postrestintaj, plej gravaj makuloj lingvaj de esperanto.

La moto, kiel ĉe la du jam prezentitaj, tiel ankaŭ ĉe ĉi tiuj 2 aferoj povus esti: “retro al la formoj pleje akceptitaj en etnaj lingvoj!”. La ĝustigendajn deviojn nun prezentas la formoj de 2 strukturoj reprezentataj de tiaj formuloj, kiaj “estas ...-e ...-i / ke ...”, resp. “estas ...-e”. — Temas do pri tiaj esprimoj, kiaj “Estas bone vidi vin / ke mi vidas vin.”, resp. “Estas varme ĉi tie.”

Mi sincere konfesas ke la traktadon de la aferoj antaŭis longa hezitado, kiun venki povis nur la konvinko, ke la pretendo je (ankaŭ gramatike) sana lingvo, eĉ se certe ne tuj, iam venkos la fortan inercion de malĝustaj kutimoj. Ja ambaŭkaze temas pri lingva malsano,

“monstro”, kies enradikiĝon, krom la kutimo, helpis nur la avantaĝo de relativa mallongeco (komp. ekz. “Estas bone vidi vin.” kun la responsa angla “It’s good to see you”, germana “Es ist gut ihn zu sehen”, kvankam, laŭ la kvanto de silaboj, eĉ ĉi tiu esperanta formo estas superata de ĉi lastaj).¹

Malsana en ĉiuj kazoj estas la adverba formo de la predikativoj, kaj la manko de gramatika subjekto en la koncernataj frazoj, propozicioj. Malsana, ĉar ĉi tiajn strukturojn Zamenhof supozeble elkovis sen etima bazo, pli precize, sur erare interpretita bazo etna (uzi adverbos predikative ja estas apriorie absurdaĵo). Kion li interpretis erare, estas supozeble la rusa lingva specialaĵo nomita “mallonga adjektivo” (ekz. “kharaso” en “Kharaso vidjetj tjebja” = “Estas bone vidi vin”), kiun li, tro ravita de ĝia mallongeco, enmuntis en esperanto nerimarkante (aŭ konscie neglektante) ke en similaj kuntekstoj, ekz., “kharasho” estas ne adverbo, sed (“mallonga”) adjektivo kun la destino ludi ekskluzive la rolon de predikativo (kontraŭ kiu tezo oni eĉ en AdE povas nur sofismojn uzadi). La eraro imputeblas al la indenteco de la adverba kaj la ad-

¹Do en la angla, 5 vortoj = 5 silaboj; en la germana, 7 vortoj = 6 silaboj; en esperanto 4 vortoj = 7 silaboj.—[GB]

jektiva finaĵoj.

Ĉio ĉi validas ankaŭ pri la esperantaj prop-oj pri sentoj, juĝoj (ekz. “Estas varme ĉi tie.”), ĉar en etnaj lingvoj predikative oni uzas adjektivojn aŭ substantivojn tie, sed neniam adverbojn (kaj niaj plej — kaj eble sole — fidindaj referencoj estas la etnaj lingvoj). La uzadon de “a-vorta” predikativo kaj gramatika subjekto motivas, ke ĉi tie fakte temas pri elipsaj esprimoj, kie la montra (resp. “persona”) pronomo aludas al strukturo el (elipsita) substantivo kaj adjektivo (ekz. “Tio estas (ago) bona vidi vin.”,

“Tio estas (travivaĵo) bona, ke mi vidas vin.” resp. “Ĝi (t.e. la aero) estas varma.”).

Por preventi eventualajn protestojn kontraŭ la mallongigo de la esprimoj, mi provadas uzi la formon “sti” anstataŭ la tradicia “esti” (al kiu mi ne ĝisoste insistas). Decidu ĉu ĝi stas vivpova aŭ ne.

Cetere, ĉio ĉi ne malebligas la uzadon de la esperanta specialaĵo de “verba predikativo” (ekz. “Gravas, ke mi vidas vin.”), kvankam ankaŭ ĉi tiu lingva aperaĵo bezonas kelkan kritikan rimaron. □

TREVOR KAJ KATJA STEELE EN HINDIO

DE VENKATESH REDDY

Al AEA: Estimataj,

Saluton unue,

Mi, mia familio kaj ĉiuj esperantistoj dankegas al ĉiuj kiuj helpis donaci monon al ni esperantistoj. Ankaŭ al ges-roj Steele kiuj sciis pri ni kiam ili estis ĉe ni. Certe ni utiligos tiun monon por la esperanto-movado.

Due,

Mi volas skribi iomete pri ges-roj Steele, kiam ili ĉeestis kun ni esperantistoj por kvar monatoj en 2004. Tre grave estas. Oni ne povos forgesi por multaj jaroj, eble dum la tuta vivo de la esperanto-movado en Bangaloro kaj Hindio.

Miloj da hindiaj geskoltoj konatiĝis kun esperanto en tiu periodo Tion eblig-

is geSteele-oj.

Iomete pri mi:

Laŭprofesie mi estas advokato, naskiĝinta kaj loĝanta en la sudhinda provinco Karnatak, urbo Bangaloro. Mia renkonto kun esperanto estis kiam mi estis 16-jara, kiam esperanto venis en mian vojon. Mi revis tiam, ke mi devas fari ion. En 2003, mi skribis al la antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA Trevor Steele, petante lin helpi min je mia revo. Li volis scii pri la situacio ĉe ni. Mi klarigis per leteroj, telefonvokoj kaj faks-mesaĝoj. Post kelkaj monatoj li konsentis veni kun sia edzino Katja, al Bangaloro.

Bonvenon:

Kiam mi renkontis S-ron Steele en

aviadilstacidomo kun mia familio, li memorigis min pri Pastro Carrol el Usono, kiun mi renkontis kiam mi estis 4-jara. Tio donis al mi kuraĝon ke ili ambaŭ venis al ni por helpi ne nur disvastigi esperanton sed ankaŭ por semi la semojn de tre urĝa mesaĝo: La Paco.

La komenco:

La komenco ne estis tre glata kaj feliĉa, sed ni komencis. Ili loĝis en skoltinejo kie mi aranĝis loĝadon en centra parto de Bangaloro.

Ili grandenergie esperantumis de la komenco ĝis la lasta tago, kaj mi volis sperti samon de ili.

Mi vizitis ilin ĉiumatene kaj ĉiuvespere. Ili estis tre simplaj, bonkoraj kaj simpatiaj kun ĉiuj esperantistoj kaj mi, sed ĉiam laboremaj. Tiutempe mi konatiĝis kun multaj alilandaj esperanto-informoj kaj esperantistoj kaj pri la movado, revuoj, korespondataĵoj el diversaj landoj. Ĉiutage mi kunportadis en mia teko instrumaterialon kaj legadis ĝin dum la busvojaĝo, montris al la geskoltuoj, kolegoj kaj studentoj. Frumatene, antaŭtagmeze, vespere, en lernejoj, en restoracioj, en komputilejo.

Ni renkontis la estron de la skolta movado en Karnataka Ŝtato, informis lin pri nia movado kaj provis konvinki lin pri la valoroj de esperanto kaj decidi disvastigi ĝin en la skolta movado. Kion li konsentis. La provo estis sukcesa. Venis la ideo kun skoltestroj prelegi kaj instrui en skoltaj tendumadoj. Tion ili daŭre faradis dum niaj vizitoj dum la skolta lerneja festo de amikeco kaj paco.

Mi pensas, ke ili faris sian ĉefan celon la disvastigo de esperanto ĉefe inter la junuloj. Granda tasko. La spertoj kiujn ili donis al mi kuraĝigas min aranĝi azian kongreson en Bangaloro.

Tiu sperto helpas min rilate al mia orfejo kaj la esperanto-domo kiun mi volas starigi. Ili dediĉis multege da energio, tempo kaj mono favore al la esperanto-movado kaj disvastigo de paco kaj amikeco.

Ili vizitis la parcelon kie mi volas konstrui la esperanto-domon, kiu situas kelkajn kilometrojn ekster la periferio de la granda urbo Bangaloro. Ĝi estas tre malfacile atingebla, pro mallarĝaj vojoj en malbona stato, sed ili donis al ni kuraĝon antaŭenigi la planon. Trevor konsilis, ke mi celu domon kun diversaj uzoj, por la bono de esperanto (kursoj, renkontiĝoj, ktp.), sed ankaŭ luigeblan al neesperantistoj kiel gastejon (por malgrandaj geedziĝaj festoj, festovesperoj ktp.)

Kiam ni veturis en busoj aŭ aŭtoj aŭ rikiŝoj aŭ trajno, aŭ marŝante, estis tre simpla, feliĉa kaj ĝojinda veturo. Malfacile por ili estis, unue adaptiĝi al la klimato: 38°C, kaj daŭra alta humideco. Kaj krome: mallarĝaj vojoj, mallarĝa kvartalo, restoracioj, laŭtparoliloj, tro da homoj kaj da veturiloj sur mallarĝaj vojoj ofte malbonkvalitaj. Motorcikloj, bicikloj, surradaj plataĵoj (ŝarĝitaj per fruktoj, legomoj, plasto, papero, aŭ io ajn) puŝataj de maldikkruraj viroj, bovcaroj, azenĉaroj, kaj libere vagantaj bovinoj. Bonvolu forgesi la svarmantajn piedirantojn, laŭtegan klaksonadon, kaj

trafikon ĥaosan.

Trevor kaj Katja gvidis 10-tagajn kursojn en diversaj lernejoj.

La lernejoj estas:

Skoltina Centro en Bangaloro
 Stella Maris Convent School
 Lernejo Adarsha
 Florence Public School
 Cluny Convent School
 Nirmala Rani Convent School
 Goodwill Christian School (Karnataka Ŝtato)
 Fathima Convent en Salem
 Holy Cross Matriculation School (Tamil Nadu)
 Holy Cross Brothers en Chennai
 Holy Cross Brothers en Salem

Trevor dufoje faris prezentan esperanto-lecionon al proksimume 200 geskoltoj kaj deko da iliaj gvidantoj en la skolta tendumejo en Parko Annie Besant. Li vizitis la similan tendumejon Sankara Nilaya en Salem (Tamil Nadu).

Al 20 elitaj sciencistoj prezentis Trevor unuhoran prelegton pri esperanto en NIAS (*National Institute of Advanced Studies*, filio de *Indian Institute of Science*).

Estis esperanto-instruado al deko da softvaraj oficistoj de la firmao Sysarris.

Mallonga artikolo pri esperanto kaj ilia agado aperis en *Indian Express*. Kaj iom pli ampleksa en la tagĵurnalo *Decan Herald*.

Festo okazis por ĉiu lernejo post la kurso. Ĉiu kursfininto ricevis belan koloran diplomon, kies disdoniĝo iĝis kutime festo kun multege da fotado. Ili elektis ĉiufoje unu reprezentanton de la novaj esperantistoj, kiu iĝis TEJO-membro pere de la fondaĵo Canuto.

Ĉi tiuj junuloj pretas kunteni kaj informadi la esperanto-grupon de sia lernejo. Ili vizitadis la grupojn, ili renkontis kaj ĉeestis la programojn. Tuj post la finiĝo de ĉiu kurso ili diskutis kun niaj kursintoj kaj klarigis multajn aferojn. La elektitaj gejunuloj estis aparte kunvokitaj, interkonatigitaj, informitaj pri la movadaj aferoj kaj instigitaj al aktivajtoj.

Trevor kaj Katja renkontis lernejajn estrojn. Ili ricevis dankleterojn de infanoj. Iliaj donacetoj, la lernejaj ceremonioj, centoj da fotoj kun ili faritaj — ĉio ĉi restos por longa tempo kun ni. Bonkore farita laboro realiĝos en Hindio tre frue.

Geedzoj Steele renkontis esperantistajn ges-rojn Saranath en Whitefield, Ranganayakulu en Tirupati, Pradhan en Bangaloro, Vijayakumar en Tirupati, Ramaswamy, Tekur, Hari Rao, kaj Sheila en Bangaloro, kaj intersanĝis ideojn por la movado. □

SUKCESIS EN LA EKZAMENOJ

Baza: Heather Heldzingen (Viktorio)

Meza: Ivan Heldzingen (Viktorio)

Elementa: Jennifer Pender (Kvinslando)

Supera: Nguyên thi Ngoc Lan (Hanojo)

MORTO DE ALI B. MILANI

Ali Milani estis agema antaŭeniganto de esperanto dum sia tuta vivo. Kiel studento en la urbo Ishqabad, Turkmenistano, li eklernis esperanton ĉe la prestiĝa Baha'a lernejo ligita al la Baha'i Domo de Adoro en Ishqabad. Ali iĝis flua parolanto de esperanto, partoprenante en esperantaj agadoj en la Britujo, Usono, kaj Aŭstralio.



Ali B. Milani
13 oktobro 1913-
25 marto 2005

Dum multaj jaroj li kuraĝigis personojn en multaj landoj lerni kaj uzi esperanton per koresponda kurso kiun li mem organizis kaj fondis el sia domo. Lia plej granda ĝojo estis ĉeesti internaciajn esperantajn kongresojn en Eŭropo, Ĉinio kaj Aŭstralio.

Profesie, Ali estis elektrentrepren-

isto, kun sia propra entrepreno pri fabrikado de elektrikaj kondukiloj en Irano. Li vojaĝis multe tra la lando por instali la unuajn grandajn elektrajn generatorojn kaj metodojn pri distribuado en multaj urboj, grandaj kaj malgrandaj.

Li kaj lia edzino, Hosnieh, havis kvar infanojn — S-ino Manije Modabber, kiu nun loĝas en Sidnejo; Profesoro Rahim B Milani en Papua Nov-Gineo; S-ino Lidia Diba kaj S-ino Elham Milani en Usono. Post vivo longa kaj servema, loĝinte en Turkmenistano, Irano, Anglujo, Usono kaj Aŭstralio, Ali Milani forpasis en Sidnejo post mallonga malsano je la aĝo de 91 jaroj, je 25 Marto, 2005. Post la funebro ĉe la tombejo Macquarie Park en Sidnejo, granda memoriga kunveno de amikoj festis lian vivo de servo. Li lasas 4 infanojn, 10 genepojn kaj 9 pragenepojn.

(Detalojn sendis Rahim Milani, tradukis Margaret Chaldecott) □

por ridigi vin

Per aloo al vigla aĝado
sanas Vi ankoraŭ 100-jaraĝe,
se aloon manĝas Vi kuraĝe!
Ne hezitu, tuj ekaĝu,
manĝu ĝin en ĉiu tago!

(Reveno al la manĝoj de ĉiela patro. Saniga menuo. Kristina-Maria Luite; kovrila reklamo. — rimarkis Ionel Onet)

[El *La ondo de esperanto*]

PRI ĈIRKAŬ LA DOMO

DE ERHARD CLAUS



Varanus acanthurus brachyurus

Ni loĝas en Karana Downs sur landpeco de unu hektaro, kiu kliniĝas suben al la Brisbana Rivero. Estas multe da arboj kaj kelkaj de ili tre aĝaj. Estas ankaŭ multe da birdoj, precipe kolomboj, mielomanĝantoj kaj sovaĝaj meleagroj. Nur unufoje pikila formiko-manĝanto estis vidita nokte.

Du varanoj ofte venas matene pro espero por iu matenmanĝo, kiu povus esti fromaĝo, viando aŭ ostoj (ostoj de iuj ajn aĝo aŭ stato). Varano ja posedas naztruojn, sed ĝi flaras ĉefe per sia blua, tre maldika forka lango. Unu el tiuj bestoj estas granda, preskaŭ du metrojn longa. Mi kredas pro ĝia grandeco, ke ĝi devas esti vira animalo. Kiam ajn mi malfermas la pordon, li tre ekscitiĝas, kaj ne estas facile teni lin ekster la domo. Mi nelonge nutris lin per mano, ĉar li evoluigis guston por miaj fingroj, kaj unu matenon li mordis mian manon. Ŝajnis profunda vundo. Neniam antaŭe mi vidis tiom multe da sango, eble ĉar mia sango estas maldensa kaŭze de manĝi krudajn cepojn. Mi veturis al ku-



Varanus giganteus

racisto por kontroli la vundon. Li purigis la vundojn, surmetis plastrojn kaj demandis kiam mi lastafoje ricevis tetano-injekton. Sed mi neniam antaŭe bezonis tion. Tial li pikis min per sia tetanoadlo. Kaj mi ankaŭ ricevis preskribon por antibiotiko, kion mi ne aĉetis. Ne estis bezono por tio, ĉar la vundoj ne doloris, ne estis inflamo kaj ankaŭ ne svelaĵo. Post nur kelkaj tagoj la vundoj ŝajnis resanigitaj sen cikatro, sed estis ankoraŭ sentemaj al tuŝo dum longa tempo.



Varanus scalaris

Kion instruis tio al mi? Nu, mi nun scias, ke varanoj havas akrajn sed nevenenajn dentojn. Tiuj bestoj estas sovaĝaj, sed ne



atakemaj, kaj ĉiam malsataj. Tiu ne mordis min pro timo aŭ malico. Nur

miaj fingroj odoris tiel bongustaj, ke li ne povis rezisti la oportunon. Ni estas amikoj ankoraŭ.

Ekzistas pli ol tridek specoj de varanoj en Aŭstralio, plejparte en la norda duono de la kontinento. Oni povas vidi fotojn kaj detalojn ĉe:

<http://www.kingsnake.com/oz/lizards/monitors/monitors.htm> □

ALMEMBRARAJ INFORMOJ ELSTARAJ

DE MARCEL LEEREVELD

La Estraro decidis, (nur unufoje) subvencii esperanto-lernantojn de Montessori-lernejo en W.A., por ke ili povu alvojaĝi kaj viziti esperanto-lernantojn de svisuja Montessori-lernejo. Ĉar eble morale ne justus uzi monon el la fondusoj, kaj por tiu vojaĝo neniu mono asignatis dum la ĵusa AEA-Jarkunveno (ĉar tiam ne petita de la lernejo), la Estraro akceptis mian proponon donaci \$10.000 al la lernejo por la vojaĝkostoj de la 9 lernejoj, kaj uzi por tio la duonon de la asignitaj \$20.000 por subvencii neesperantistajn instruistojn partoprenontajn en nia onta Somerkursaro. Sekve de tio ni povos subvencii nur 10 tiajn instruistojn anstataŭ 20. (Cetere ni pasintjare sukcesis trovi nur 5). La de ni subvenciotaj vojaĝo al Svisujo okazos ĉi tiun jaron, kaj ni deziras al la grupo (12) plezurajn kaj esperanto-plenan restadon ĉe la svisa lernejo.

En la Jarkunveno ni decidis donaci ĝis \$AŬS5.000 al indonezia esperanto-aktivilo, sed nur \$1000 ĉiudumonate kaj nur post ricevo de detalaj pruvoj pri la uzo de la senditaj \$1000 kaj de detalaj informoj

pri planoj por la elspezo de sendotaj \$1000. Pro miskompreno inter estraranoj la unuan fojon sendatis \$2000, kaj ni atendas la informojn pri la plano kiel elspezi la duan (=trian) sumon. Krome la esperantisto postulas por sia laboro salajron de \$?300 monate. Sen iuj el niaj membroj surloke estas tre malfacila juĝi, ĉu nia (=via!) mono ĝuste uzatas. Mi eĉ proponus sendi malajparolantan membron de AEA por esplori kaj por helpi kiel saĝe uzi nian monon kaj por tiel aŭ savi \$15.000 aŭ elspezi \$15.000 utile. Tia persono tre verŝajne haveblas, sed liaj vojaĝkostoj devus pagati de AEA.

Ni ankaŭ proponis al la indoneziano, ke li kaj ni organizu niajn 2007-ajn Somerkursaron kaj Jarkunvenon en lia uzbo Jogjakarto, por helpi la esperanto-lernantojn indoneziajn kaj por inviti partoprenantojn ankaŭ el aliaj aziaj landoj (speciale Ĉinujo kaj Japanujo). Sed lia akcepto estas hezita, kaj ni ne komprenas kial.

Ni petas al la Libro-Servo presatigi la novan por infanoj kaj lernejoj *Mummy*,

→ p.26

FOR THE BEGINNER

BY MARCEL LEEREVELD

SOME DIFFERENT THOUGHTS FOR THE BEGINNER

We all, and especially those of us not versed in grammatical perceptions and jargon, are very thankful to the Editor for his very good clarifications, in English, contained in “For the Beginner”. It would be abnormal, though, if his explanations were the only ones available, and it is also useful to hear something explained from two points of view.

One topic that surely needs dishing up in a very different way is the Passive and the Medial Voices. Our learned Editor explains this topic not from an Esperanto point of view but according to old-fashioned European grammatical principles, as do most Esperantists.

Here then an explanation based entirely on the workings of Esperanto grammar, although for the sake of convenience the old-fashioned terminology is kept in most cases, as your readers have been schooled in these.

First the Passive: Of course there in Esperanto a Passive Voice (in spite of the Editor), as there is in other languages. The only problem is the different ways in which it is expressed. In European languages the way the Passive is expressed looks rather illogical and impractical, if we compare it to Esperanto, because during the ages it changed from other, more logical, expressions. The same is the case with the different tenses of the verb.

But in our native tongue we do not notice all this, until we learn a foreign

language. To stick to English, we can say that it is a very analytical language, which means that it may often use two or three words to convey two or three parts of a single notion we have about a thing or an action around us. For example, “I am now drinking a cup of coffee”; “They did indeed visit Rome”; “How shall we fix that?”; “We have been shopping last night”.

In some other languages they use only one word for the two or three in English: “Ik *drink* nu een kop koffie”¹; “Sie *bisuchten* in der Tat Rom”²; “Comment *arrangerons-nous* cela?”³.

If I want to convey that rain will be falling soon, I convey just one notion. In French “Il pleuvra” (which comes originally from “It has to rain”). In English we need two verbs for the same one notion: “It will rain soon”. Of course in Esperanto we would use for that one notion only one verb: *Pluvos*.

Something similar happens with what we call the Passive Voice. The Active means that the focus is on somebody or something that does an action, as in “She *washed* the child” (*Ŝi lavis la infanon*). The Passive means that the focus is on the receiver of the action: “The child has been washed” or “The child was washed”. (I.e., washed by the mother.) Again there is only one action, so one word in Esperanto,

¹ Dutch, ² German, ³ French

marked by a reversing suffix (-at-): “La infano lavatis (de la patrino). In other words, the Passive is a definite notion, in Esperanto as well as in English. If we don’t like the old word “Passive”, we can call it in Esperanto a “reverse phrase”, *retrovida frazo*. But what matters is not the name, but the notion of one action in both English and Esperanto.

Unfortunately, Zamenhof did not dare to not follow the impractical German/French/English way of saying it, but at least he left the door open to express the Passive properly.¹

Old-fashioned Esperantists still use Zamenhof’s European-like compound verbs for the one notion. Some European languages (Zamenhof probably did not know them) nevertheless do the same with the Passive as Esperanto: English “I was

¹ In *Lingvaj Respondoj* #12 Zamenhof wrote: La formoj “amatas”, “amitas” k.t.p. anstataŭ “estas amata”, “estas amita”, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia propra iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se as, is k.t.p. signifus “estas”, “estis” sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo “esti”, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas. — In recent decades, nevertheless, such forms have become very common among Esperanto writers. However, neither the Lingva Komitato nor its successor the Akademio de Esperanto seems to have ever considered the matter, nor is any such method mentioned or hinted at in the only official Esperanto grammatical authority, the *Fundamento de Esperanto*. — ☐

praised by the teacher” = Esperanto “Mi laŭdatis de la instruisto” = Norwegian “Jeg rostes av læreren”. In old (Zamenhofian) Esperanto instead of “laŭdatis”, “estis laŭdata” was used, which also meant (and still means) “was being praised”, not at all the same.

The same Greek/Latin/German syndrome confuses the Editor when he tries to explain the, according to him in Esperanto non-existent, Medial Voice.

The notion of this Voice is alive in ethnic languages, and of course also in Esperanto (which otherwise would be a poor language) This notion of looking at an action in reversed sequence (first the receiver of the action and then the action coming as it were by itself) is expressed in English with the “auxiliary” *get* (in older English with “become”): “(The program) *got interrupted* (for five minutes)”.

In Esperanto, Zamenhof cleverly used one word: “(La programo) *interrompiĝis* (dum kvin minutoj)”. This notion represents a picture in which we do not say (or not know) who or what is behind the action, as if an action normally caused by somebody or some-thing else just happens by itself. The interruption could happen because of an accident on stage, or a planned or unplanned public announcement, or an electrical fault, or anything.

In this Voice nobody can be accused of causing the action; that is so to say left undecided, in the middle (= “medial”). Our Editor still maintains that the Medial Voice does not exist in Esperanto. How then would he translate the above English sentence, or sentences like “The rain

started at 8 o'clock” or “The plate broke into two pieces”? With the Medial Voice suffix, of course: “La pluvo *komenciĝis* je la oka horo” and “La telero *rompiĝis en du pecojn*”.

Esperanto always uses the suffix “iĝi” for the Medial Voice, while English uses generally “to get”, French uses the reflexive, and German the adverbial “by itself”. Esperanto is very fortunate to have a special form for the Medial Voice, and uses this voice extensively: *sunbruniĝi* = to get into a state of being suburnt as if something does the burning; *endormiĝi* = to get into a state of sleeping as if something forces you to fall asleep; *reĝiĝi* = to get into a state of being a king as if forced so by circumstances. Note that to become kingly = *iĝi reĝa*.¹

¹ The situation is actually less convoluted. Zamenhof used both *-iĝ-* and *-ig-* as the nifal and the hifil verb forms are used in ancient Hebrew, a language in which he was highly skilled. (He translated the entire Hebrew Bible from Hebrew and Aramaic into Esperanto.) In ancient Hebrew the hifil and the nifal were a contrasting pair, exactly as *-ig-* and *-iĝ-* in Esperanto. The Esperanto verb system, in general, imitates the ancient Hebrew verb system, supplemented with the concept of tense. Modern Arabic uses a similar system, as did/do Aramaic and Syriac.

The Esperanto terms *sidiĝi*, *aspektiĝi*, *estiĝi* and many others simply mean “to become seated”, “to take on the appearance”, “to become” etc. It would take a very convoluted argument indeed to interpret these “as if something forces you to become seated, to have some appearance, to be forced to become. On the contrary, they are actions either undertaken voluntarily by the subject, or in many instances not actions at all. —[E]

The Editor’s explanation of the Participles is much better and free of the Greek /Latin bias. He makes it very clear that participles in English are often verbs combined with auxiliaries: to form tenses or voices or aspects of verbs: “They *have accepted* him as equal”, “He *will be accepted* as equal”, “They *are looking* for a better result”.

Participles in Esperanto are not verbs but adjectives belonging to nouns (or pronouns): “The *accepted* way of behaving”, “They remained *looking* through the window”, “Don’t disturb the *sleeping* patient”, “A *returned* soldier”, “The *returned* bottles” — La *akceptita* / *-ata* / *-ota* kondutmaniero; Ili restis *rigardantaj* tra la fenestro; Ne malkvietigu la *dormantan* pacienton; *Retroveninta* soldato; La *retrodonitaj* boteloj.

In Esperanto, Participles are only adjectives with special suffixes (*-anta*, *-ata*; *-inta*, *-ita*; *-onta*, *-ota*), which indicate verbal aspects attributable to nouns. These aspects are:

- 1) that an action has not finished yet, and may never be completed;
- 2) that we feel now the result of an action which took place earlier;
- 3) that we are expecting an action to happen soon and feel the effect of its coming.

Here again Zamenhof was a genius creating such a regular set of aspects, and our Editor explained it cleverly. □

TOKI

VERKIS PATRICIA GRACE
ELANGLIGIS DONALD ROGERS

El la nordo venis Toki, en sia juna aĝo. Ho, jes. Blagemulo estis tiu, Toki la fiŝkaptisto.

“Tie abundas ĉiaj fiŝoj”, li diris, “en la maro de la nordo: la *tamur*¹, la *tarakihi*, la *moki* kaj la *hakupu*. Kaj Toki, li havas la fiŝŝnuron kaj la manon por ili ĉiuj”, Toki el la nordo, Toki la fiŝkaptisto.

Sed ne kiel fiŝiston ni vidis lin tiam, sed kiel blagemulon kaj fremdulon, rigardatan suspekto de multaj — kaj nomitan de ni Toki Fiŝo delonge.

Delonge ni inklinis al la sama junulino — Toki kaj mi. Bela junulino ŝi estis, kiu atentis miadirekte ĝis kiam li venis kun blagama sinteno — promesita al mi, tiel aranĝite inter niaj familioj. Tiam venis Toki, kaj ŝia kapo turniĝis ĝis kiam mi montris lin blagemulo.

Post la nupto de mia plej aĝa frato, kiam ĉiuj estis kunvenintaj por kantado kaj dancado, ekblagis Toki denove pri fiŝkaptaj tagoj, malestimante niajn kutimojn kaj niajn marojn. Kaj aŭskultis kun la okuloj subendirektitaj la junulino, kio estis kutimo ŝia. Tre ĵaluzis tiam mi, kaj ekstaris por paroli.

“Kiom valoras,” mi diris “kapti multajn

¹ Klarigoj pri la vortoj kursivaj troviĝas ĉe la fino de la rakonto.

fiŝojn kie abundas fiŝoj? En la nordo abundas la fiŝoj, kaj vi atendas kun viaj hokoj kaj ŝnuroj, kaj ili venas. Fiŝisto lerta kaptas fiŝojn kie troviĝas neniu por kapti.”

“Multas aŭ malmultas la fiŝoj”, diris Toki. “Tamen ili venas al mi ĉar mi havas la ŝnuron kaj la manon.”

“Kune do ni iru, morgaŭ,” mi respondis, kaj li sciis mian signifon, kiel ja ankaŭ la aŭskultantoj.

“Ne kune, sed unu, poste la alia,” li diris.

“Kune morgaŭ por elekti la lokon,” mi respondis. “Poste mi iru, kaj la postan tagon vi.”

Ĉiuj rakontis tiam, la maljunuloj, pri fiŝkaptaj tagoj, kaj multan konsilon ili donis al ni plijunaj. Sed sidis kviete mi, atendante la matenon. Tiam remis ni kune, preter la pinto de Palinura Roko kaj en linio kun Poroti kie verdo renkontas bluon.

“Ĉi tie do,” mi diris.

“Tiel,” diris Toki.

Pretis multa fiŝlogaĵo, kiam ni revenis, ĉar ĉiuj avidis vidi kiu estas la fiŝkaptisto lerta. Al la rokoj por palinuroj ili jam iris, ĉar tio estas la plej bona logaĵo ĉi-loke.

La sekvan matenon do, kun multaj

tie frue por vidi min, mi hastis foren trans la maron, je ektagiĝo, remante forte kaj rekte, preter la pinto, tiam rapide al la elektta loko por submarigi mian ŝnuron antaŭ sunleviĝo.

Ne unu el la bonaj fiŝkapejoj!... kaj dubinda je la komenco! Sed kiel la tagiĝo, venis la *tarakihi*. Subitan tiron mi sentis, kaj sciis ke multaj sekvos, ĉar tiel reagis kutime la *tarakihi*. Ok hokoj troviĝis ĉe mia ŝnuro kaj mi kalkulis ok tirojn antaŭ ol levi ĝin. Dikaj estis ili, ondantaj en la akvo dum mia mano entiris mian ŝnuron. Mi rapidis surmeti logaĵon denove kaj meti ĝin ĉe la fundo de la maro, ĉar nutras sin rapide la *tarakihi*. Kvarfoje al la surfaco venis ok. Jen bona komenco. Sed la postan fojon, mi tiris la ŝnuron, kaj venis la kapoj de miaj *tarakihi* sed ne la korpoj. For. La laboro de iu *hapuku* tiu estis, do tre ekscitiĝis mi.

Rapidis mi por ŝanĝi la malsupraĵn hokojn per pli grandaj kaj firme ligi la logaĵon.

“Venu al mi, *hapuku*,” mi diris. “Venu al mi, oldulo. Venu al la ŝnuro de Hotene. Jen la ŝnuro por vi kaj jen la logaĵo.”

Mia mano sentis la tiron de la *tarakihi* plurfoje sed atendis. Tiam foriris la ŝnuro, pro la forta malrapida tirado de la *hapuku*.

“Mia jen,” mi diris, kaj suprenigis ĝin, ege grandan, kvankam tie ne estis la loko de la *hapuku*.

Tiam, je la malfluso, mi enrulis mian ŝnuron por ripozi kaj pretigi mian giri-

lon, ĉar jen la horo de la blinda angilo.

Ne multaj pliaj fiŝoj estis por mi tiutage, sed mi sciis ke mia kaptaĵo estas bona por tia ŝancloko. Hejmen do, malfacile mi tiris mian *paua*-konkan girilon flagrantan ĉe la malantaŭo de la boato, atendante la atenton de la *kahawai*. Preter la angulo atendis la *kahawai*, kaj disŝpruciĝis verdo kaj arĝento kiam ĝi prenis la girilon.

Feliĉa fiŝkaptisto do mi estis, celanta hejmen al la grego sur la plaĝo. Jen bonŝanca tago, kaj mi sciis, ke mi ne estos venkita. Sed tiam estis, dum mi atendis por ke la oka ondo enportu min, ke mi pensis pri kio eble okazos. Vidas ĉiujn fiŝojn miajn Toki, kaj li sciis, ke li ne povos egali en tia loko elektita. Do li iros tre for sur la maro, al la loko de la *hapuku*, tie fiŝkaptos, ĉar fortas lia blago.

Nu en ĉi tiu loko albordigi boaton estas danĝere escepte enveni per la oka ondo. Observu por la plej granda, tiam post tio, turnu vian boaton en la okan. Havas tiu la ĝustan grandecon por enporti vian boaton al la malprofundaĵo sendanĝere. Tenita for de la oreloj de Toki, jen mia protekto.

Al la montetoj frue la postan matemon mi iris, kaj de tie vidis la malgrandan boaton celi rekte al la profundaĵo. Feliĉis do mi, ke mi tenis la sekrekton de la ondoj.

Ĉeestis multaj por spekti lin reveni kaj sidis kviete por rigardi. Neniul kalkulis la ondojn Toki, sed turnis la boaton en ŝaŭmondon malgrandan, kiu alportis lin duondistance. Sed tiam venis

la granda. Grandis tiu, ŝvelanta kaj pli-grandiganta, ĝis la boato, tiam... kraŝo!

Inundiĝis la boato, kaj enakviĝis Toki kun sia kaptaĵo ĉirkaŭ li, kiel mi imagis. Toki Fiŝo ni nomis lin dum li naĝis marborden kaj tio restis lia nomo ek de tiam. Ĉiuj feliĉis ke mi montris lin blagemulo, ĉar ĉiuj sciis ke li ne iris al la elektita loko por fiŝkapti. Kaj venis apud min denove la junulino, kaj ankoraŭ restas tie kvankam maljunulino nun ŝi estas.

Iras por la *paua* kaj la *kina* nun Toki. Li ĵetas la ŝnuron de sur la plaĝo por la ŝarko, sed ne plu enboatas li, pro timo pri tio, kion oni dirus. Sed blagemulo ankoraŭ estas tiu, blagemulo ankoraŭ. Blovas forte la vento el la nordo.

“Toki” de Patricia Grace

En *Waiariki and other stories*, 1975

Traduko publikigita laŭ permeso de: Penguin Group New Zealand, 182-190 Wairua Road, Auckland 10.
www.penguin.co.nz.

NOTOJ

Kiam mi legis ĉi tiun anglalingvan novelon mi konjektis ke Patricia Grace provis komuniki trajtojn de la maori-lingva parolmaniero, precipe la vortordon. Mi ekpensis ke la vortordo en Esperanto estas pli fleksebla ol en la angla, do devus esti pli facile imiti la maorian vortordon. Ekzemple,

ka waiata te kotiro i te waiata
sings the girl the song
kantas la knabino je la kanto

Notu ke en la maoria oni markas la objekton de la verbo per prepozicio. Ankaŭ,

la maoria ne havas ekvivalenton de la verbo “esti”, do oni uzas statverbojn. Oni povas fari tiel ankaŭ en Esperanto.

ka pai te kai
is-good the food
bonas la manĝaĵo

Pro tiu frazkonstruado Patricia Grace ofte ripetas la subjekton de la frazo en la angla. Ekzemple:

“*Round the corner it waited, the kahawai...*”

“It blows strong the wind...”

La ripeto ne necesas en Esperanto.

Tradukante la rakonton Toki en Esperanton, mi provis utiligi la flekseblecon de Esperanto por prezenti la parolmanieron de la maoria lingvo (kie tiu evidentiĝis), la stilon de la aŭtoro (kaj tiu ne estas ordinara) kaj ŝian bildon de la vivo en la novzelanda kamparo tiutempe.

La nomoj de la fiŝoj pleje aperas en la maoria en la angla originalo, ĉar novzelandanoj konas ilin pli bone ol la anglajn nomojn (se ili eĉ havas anglan nomon). Tial mi lasis ilin netradukitaj en la esperanta traduko. *Hapuku* (epinefelo) estas granda fiŝo. *Moki*, *tamure*, *tarakihi* kaj *kahawai* estas mezgrandaj fiŝoj. *Koura* estas palinuro, unu el la krustuloj, sed la aŭtoro uzis ĝian anglan nomon (crayfish). *Paua* (*Haliotis*) estas ovala konkulo, kies opaleskan konkinternon oni ofte uzas por ornamaĵoj. *Kina* (*Evechinus chloroticus*) estas “marovo”, kiu havas brunan ovoforman ŝelon kovritan de dornoj, kaj tre molan internaĵon. □

 por ridigi vin 

[En Vjetnamo] viando estas malofta kaj multekosta. Ekzemple porkaĵo estas kosta kaj kakaĵon oni manĝas nur en specialaj tagoj kaj festoj kaj servas al karaj kaj honoraj gastoj!

[(*La Verda Kolombo* maj-jun 1996): laŭ *La ondo de esperanto*]

AIDOSO EN AŬSTRALIO

DE LÁSZLÓ FARKAS

Kvankam aidoso ankoraŭ ekzistas en Aŭstralio, ĝi ne plu disvastiĝas same kiel antaŭ 15 aŭ 20 jaroj. Pro la reklamoj de la Viktoria Aidoso-Konsilio petantaj volontulojn, en magazenoj kaj televido, kaj la kuraĝigo de amiko, kiu jam estis volontulo, mi volontulis post emeritiĝo, pensante ke tiel mi povas redoni mian helpon al la socio. Mia amiko prezentis min al regiona oficisto de la okcidenta parto de Melburno.

Antaŭ 15-20 jaroj estis pli ol 400 volontuloj en Melburno. Nun restas nur ĉirkaŭ 200 (de 4 jaroj aŭ pli, plejparte emeritaj), ĉar dank' al novaj bonaj medikamentoj ne tiom multe da malsanuloj estas tiom handikapitaj ke ili ne kapablas piediri, kuiri, aŭ veturi per publikaj transportiloj.

La aidoso-malsanuloj renkontiĝas en speciala sancentro en Fairfield-Domo, kiu similas al malsanulejo. Tie troviĝas psikologoj kaj konsilistoj. La volontuloj ne nur helpas ilin fizike sed kondukas kiel amikoj. Tiun pozitivan rezulton oni atingis per informado kaj edukado. Gravas ke misinformoj kaj antaŭjuĝoj estu forigitaj, ke neniu plu

kredu ke aidoso disvastiĝas per manpremo, uzo de sama kulero, forko, aŭ telero kiel malsanulo.

Gravas ke la malsanuloj ne estu diskriminaciataj, ĉar aidoso sendistinge trafas. Tiucele la volontuloj disdonas informajn flugfoliojn kaj kondomojn en publikaj necesejoj.

David, kiu mem suferis pro aidoso dum 20 jaroj, eldonis libron pri sia vivo, kiu estis vaste diskonigita, i.a., de populara televida programo per SBS. Unu virino, Michelle, regule vizitas mezlernejojn por paroli pri aidoso kaj sekura seksumado.

Kelkaj aŭstralianoj faras la saman laboron en aziaj landoj, ĉefe la informlaboron: preventi kaj eduki estas la magiaj vortoj. Se la situacio pliboniĝis en Aŭstralio, certe ĝi povos pliboniĝi ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Mi aparte pensas pri Afriko kaj la terura priskribo farita de la instruisto Oliver, kiu venis el Zimbabvo por instrui kadre de nia lasta somerkursaro en Adelajdo. Ĉu lukto kontraŭ aidoso ne estas parto de nia klasbatalo? □

🦋 por ridigi vin 🦋

Post longa atendo kliento turnas sin al la kelnero:

“Ĉu vi scias...? En via restoracio mi sentas min same kiel en mia propra hejmo.”

“Ĉu ni tiel bone nutras?”

“Ne! Ankaŭ hejme ĉiuj min neglektas!”

[El *La ondo de esperanto*]

FILMORENCENZO: CIFERUMU "M" POR MURDO

RECENZAS TONY PETERSON.

Kun Ray Milland, Grace Kelly, Robert Cummings, Anthony Dawson and John Williams. Reĝisoro: Alfred Hitchcock. Surbaze de la dramo de Frederick Nott 1954.



Ray Milland, Grace Kelly, Robert Cummings

Ciferumu "m" por murdo, la perfekta filmo de Alfred Hitchcock, pri la "perfekta murdo", estas alia de miaj plej ŝatataj filmoj.

Ray Milland estas la venĝema edzo kiu dungas teruran Anthony Dawsonon mortigi sian riĉan, senfidelan edzinon, Grace Kelly; li tiam serene havas vespermanĝon kun la amanto de lia edzino, Robert Cummings.

Tiam, io malbona okazas: la edzino mortigas sian atakulon, kaj ŝia venĝema edzo provas ĉion por pruvi ke ŝi murdis la viron intence!

Tamen, la plano de la edzo disfalas kiam la policdetektivo, John Williams, kredas la virinon esti senkulpa, kaj postkuras ŝian edzon por pruvi ke li planis ke lia edzino estu murdita. La edzo estas kaptita pro stulta eraro kiun li faras, kaj lia edzino estas savita disde la pendumilo kaj estas reunuigita kun sia amanto.

Al kelkaj homoj, ĉi tiu filmo povus ŝajni havanta tro da parolado (ĝi estis bazita sur teatrodramo), sed ne gravas, ĉar la dialogo indas aŭskulton.

Pruvante ke Alfred Hitchcock vere estis bona reĝisoro, *Ciferumu "m" por murdo* estis referita por televido en la fruaj 1980'oj kaj ĝi estis aĉega. Ĝi havis nek vivon nek iun ajn de la lertaj filmoteknikoj kiujn oni ĉiam anticipis de la "majstro de suspenso". Jen nur unu lerta ekzemplo de la genio de Alfred Hitchcock, por ilustri la malfeliĉon de la ĉefvirino: la vestoj de Grace Kelly ŝanĝ-iĝas de sovaĝaj ekstravagancaj koloroj, ekzemple brile ruĝa (kiam ŝi estas feliĉa) al malhelaj brunaj kaj grizaj (kiam ŝi atendas en prizono). Ĉi tiu lerta uzo de koloro helpas la prezenton faritan de Grace Kelly enorme.

Ankaŭ, ĉi tiu filmo estis originale farita en 3-D, kaj multaj scenoj havas bonegan efikon ĉar vi sentas ke vi estas parto de la sceno (precipe kiam Grace Kelly ponardas Anthony Dawsonon, kaj li falas sur la murdilon: tondilo). Estas rimarkinde brilega momento en la historio de filmoj!

Ĉi tiu estas mia plej ŝatata filmo de Alfred Hitchcock. Kvankam *Psycho* estis pli timiga, kaj *Nord-nortokcidente* havis pli da ekscito, mi vere ŝatas *Ciferumu "m" por murdo* ĉar mi ĉiam trovis ĝin esti filmo kiu neniam perdas intereson, kaj estas baze tipo de filmo kiun oni ne vidas nuntempe. Kia bonega filmo! □

FILM REVIEW: DIAL "M" FOR MURDER

REVIEWED BY TONY PETERSON.

With Ray Milland, Grace Kelly, Robert Cummings, Anthony Dawson and John Williams. Director: Alfred Hitchcock. Based on the stage play by Frederick Nott. 1954.



Alfred Hitchcock

Dial "M" for Murder, Alfred Hitchcock's perfect film about the perfect murder, is another of my favourite films.

Ray Milland is the vengeful husband who hires nasty Anthony Dawson to kill his rich, unfaithful wife,

Grace Kelly; he then calmly has dinner with his wife's lover, Robert Cummings.

Then, something bad happens: the wife kills her attacker, and her vengeful husband does everything to prove she murdered the man on purpose!

However, the husband's plan falls apart when the police detective, John Williams, believes the woman to be innocent, and pursues her husband to prove that he planned for his wife to be murdered. The husband is trapped by a silly mistake he makes, and the wife is saved from the noose and is reunited with her lover.

To some people this film could seem to have a bit too much talking (it was based on a stage play), but that is not important be-

cause the dialogue is worth listening to.

To prove that Alfred Hitchcock really was a good director, *Dial "M" for Murder* was re-made for television in the early 1980's and it was dreadful. It had no life or any of the clever film techniques one could always expect from the "master of suspense".

Here is just one touch of Alfred Hitchcock's genius to illustrate the leading lady's plight: Grace Kelly's costumes go from wild, extravagant colours, for example brilliant red, (when she is happy) to dull browns and greys (when she waits in jail). This clever use of colour helps Grace Kelly's performance enormously.

Also, this film was originally made in 3-D, and many of the scenes have a great impact because you feel as if you're part of the scene (especially when Grace Kelly stabs Anthony Dawson and he falls on the murder weapon, a pair scissors). It's a remarkably vivid moment in screen history!

This is my favourite of all of Alfred Hitchcock's films. Although *Psycho* was scarier and *North by Northwest* had more excitement, I really like *Dial "M" for Murder* because I have always found it to be a film that never loses its interest, and is basically the type of film you don't see nowadays. What a great film!

Ĉi tiu estas la dua en serio de dek filmorecenzoj verkitaj de Tony Peterson por aperigo en *ĜJK*.

This is the second in a series of ten film reviews by Tony Peterson written for *ĜJK*.

[←p.16] *Why Can't We All Speak the Same Language* verkita de Nicole Else. Se vi havas junajn infanojn, aŭ povas uzi ĝin en (elementaj) lernejoj, mendu ĉi tiu bonegan libron ĉe la Libro-Servo. La prezo estos tre sub \$10.

La indoneziano ankaŭ proponas, ke la Oceana Komisiono donacu kromajn \$15.000 por ke li povu alkonstrui al sia domo ĉambbron por i.a. okazigi esperanto-kursojn. Unu estrarano nia proponas, ke donacu AEA tiun sumon.

La Jarkunveno decidis ankaŭ, elspezi ĝis \$3000 por dungi neesperantistan firmaon helpi nian Kasiston. Sed ni ŝparis tiujn \$3000 ĉar mi trovis kvalifikitajn AEA-membrojn kiuj, kompreneble senpage, solvos por la kasisto iujn ajn financajn problemojn. Ili jam sukcesis konvinki la Impostinstitucion ne imposti AEA-on, tiel ŝparante al ni kroman \$20.000. Mi esperas ke ankaŭ en aliaj kampoj de nia agado ni uzos volontulajn membrojn anstataŭ dungi esperantistojn aŭ neesperantistojn.

En la Statutoj de esperanto- kaj aliaj nekomercaj asocioj oni ĝenerale kondiĉas, ke de la organizo salajrata persono ne povas esti membro de la Estraro. En la statuto de AEA tio ne menciigās, sed mi supozas, ke tion la membraro postulas, kiel en aliaj tiaj organizoj. En tia kazo la Somerkursaro rajtas pagi salajron (t.e. kostoj por loĝado kaj vojaĝado) al instruisto kiu hazarde estas estrarano, sed AEA mem ne povas fari tion. AEA povas pagi por elspezoj de estraranoj, se ĝi volas, sed ne por laboro (tempo) farita de estrarano. Estas utila, ke ni memoru pri

tiu (morala) kutimo.

La Estraro pruntedonis \$500 al la organizintoj de la venonta Somerkursaro, por antaŭpagi garantion pri loĝado. Ili verŝajne bezonos pluan prunton (presado, ktp), antaŭ ol ili ekricevos la registriĝ-kostojn el la partoprenontoj. Evidente la kursaro bone organizatas, kaj ni gratulas ilin pro tio, kaj pro la akceptebla prezstrukturo, sama kiel antaŭe. Ni instigas ĉiujn aŭstraliajn esperantistojn peni preni parton, por sia propra kleriĝo en esperanto, kaj por helpi starigi viglan esperantomovadon en tiu suda parto de NSW.

AEA elspezis \$800 por novaj komputilaĵoj por la redaktisto kaj por la sekretario.

La Estraro devis ankaŭ elspezi \$7.580 el via mono por venigi eksterlandajn instruistojn al la adelajda kursaro. Por la venonta la Jarkunveno decidis elspezi ne pli ol \$2000 por tiu celo. Pro juraj tialoj (kaj pro miskomprenoj) la Estraro devis pagi \$760 por neuzitaj ĉambroj en hotelo en Adelajdo.

Aliflanke AEA ricevis \$2.500 kiel la duonon de profitoj faritaj de somerkursaroj en Adelajdo antaŭ la lasta.

La Estraro starigis dekon da laborgrupoj por aktivi pri specialaj poresperantaj taskoj. Tiuj grupoj intencas raporti al la membraro pri sia laboro. Ni dankas tiujn aktivulojn, kies volontula laboro estos tre grava por esperanto en Aŭstralio.

P.S. Kiel Prezidanto mi ne povas ne emfazi la gravegan laboron faratan de *kaj* nia Kasisto, Steve Pitney, *kaj* nia Redakt-

isto, Don Broadribb. Steve pasigis kaj pasigas multan tempon kaj spertecon (kaj sian monon) por profesie kaj sukcese zorgi pri niaj kontoj, krome savante al ni almenaŭ \$8000 por neuzitaj kontrolistoj, kaj kromajn elspezojn por de li donacitaj komputilaĵoj.

Don jam dum multaj jaroj senlace donas multe de sia tempo por zorgi, ke *ESK* estu unu el la plej interesaj esperanto-gazetoj en la mondo. AEA estus “malriĉa” organizo sen ilia siofero, kaj mi fieras havi la ŝancon labori kun ili kaj rimarkadi ilian klerecon. □

NOVA PETO PRI LA HISTORIO DE ESPERANTO EN AŬSTRALIO

Mi deziras rememorigi la membrojn en la ŝtatoj, ke se ili deziras aldoni al la historia projekto aŭ korekti ion en la proveldono, ke ili sendu tion al mi kiel eble plej baldaŭ.

Terry Manley
50 Alagalah St
Narromine
NSW 2821
teren@ans.com.au

BOB FELBY

proponis kelkajn pli belaspektajn fotojn de li uzindajn anstataŭ tiun aperintan en nia majo-junia numero. Ni proponas al vi du el ili:

La foto aperinta en la majo-junia numero.



Proponita pli belaspekta foto



Kaj manĝanta patkukon



Konsentendas ke la novaj fotoj pli bele prezentas nian adelajdan samideanon, kaj ni proponas ke niaj legantoj imagu (aŭ eĉ surgluu!) unu el ili anstataŭ tiun presitan en la majo-junia numero. — ☒

🖱 • **aea on the internet**

<http://www.esperanto.org.au/aea/>

Our Internet site is a mine of information about AEA. One of the newest features is the “Workgroups” section which details, on separate pages: How to help with the AEA Summer School; Volunteer recruitment and management; Education; AEA bookshop; Scouts and Guides; Travel team; Traid team; Communications; Harmony team; Exhibition; Families and homeschoolers. These Workgroup pages also include links to Internet groups involved with the specific topics.

The AEA’s Internet site also makes available for download *all* previous issues of *Esperanto sub la Suda Kruco*. They are in pdf form, which can be read on all computers with the free Adobe Reader (details on the page listing the magazine issues.)

(By the way: take a look at <http://groups.yahoo.com/> and enter the word Esperanto in the “Search” section. As of 13 June 2005, 387 discussion groups were listed!)

🖱 • **interrete**


ĈU VIN INTERESAS ARTAĴOJ?

Du retejoj do verŝajne interesos vin.

La unua estas <http://free.x3.hu/ballajano/index.html>, kiu havas la galerion de la hungara skulptisto esperantista Johano Balla. Jen provekzemplo de liaj verkoj:



La dua estas <http://rivero.icpcn.com>, de mongola esperantisto Changhe Xue; ĉe tiu retadreso vi trovos aron da liaj pentraĵoj. Jen provekzemplo de liaj verkoj:



OPINIO

DE TERRY MANLEY

Dum la pasinta JĜK de AEA en Adelajdo estis decidita daŭrigi la kutimon havi kursaron ĉiun jaron, anstataŭ kursaron ĉiun duan jaron kaj kongreson en la interaj jaroj. La voĉdono ne estis tre forta por la kursara flanko. 14 kontraŭis nuran kongreson kaj 10 estis por kongreso (*ĜK* majo-junio 2005). Kvankam plaĉas al mi la kursaroj mi opinias, ke tiu voĉdono ne estis justa rimedo por decidi.

Dum miaj jaroj kiel esperantisto mi rimarkis, ke iuj ne deziras partopreni en kursaro sed preferas kongresi. En la jardeko 1990+ mi partoprenis Somerkursarojn en Adelajdo kelkfoje kaj tre entuziasmiĝis pro tiuj. En mia loka klubo mi provis kuraĝigi klubanojn partopreni, sed el iuj ricevis la saman respondon — “Mi ne partoprenas somerkursarojn.” En 2000 kiam ni en Sidnejo organizis AEA-an kursaron/kongreson, mi provis konvinki la partoprenontojn, ke kursaro kaj kongreso ne estas tre malsimilaj. Sed eĉ post tio unu aliĝinto tute ne partoprenis la matenajn sesiojn kvankam la lingva nivelo estis kaj alta kaj interesa. Li diris al mi, ke li venis por kongresi.

Mi tre ĝuis la kongreson en Redcliffe en 2004 kaj vidis vizaĝojn kiuj ne partoprenas en somerkursaroj. Mi gratulas la Kvinlandanojn pro la bona aranĝo kaj la kuraĝo okazigi kongreson kvankam AEA petis kursaron. (En la protokolo de la 2003a kunveno “Per levo de manoj, la plejmulto (11) montris subtenon por kursaro.” *ĜK* majo-junio 2003. Fakte ne estis plejmulto ĉar 31 ĉeestis la kunvenon).

Do mi opinias, ke voĉdono por kursaro en la kadro de kursaro estas partiema. Kompreneble la ĉeestantoj de kursaro ŝatas kursarojn! Sed kio pri la ŝatantoj de kongresoj? Oni ne povus simple diri: “malbonŝancon al ili, ĉar ili ne ĉeestis la JĜK-on”. Kaj same ne estus egale juste demandi dum kongreso, kion oni preferas.

Do, ĉu per *ĜK* ni devos demandi?

Kvankam oni voĉdonas por tiu afero, verŝajne la findecido restas kun la organiza ŝtato. Kiel en la kazo de Kvinlando en 2004.

PS Pro laboro, familio kaj financo, mia propra prefero nun estas por semajno da Esperantumado, kia ajn. Se nur tio permesas al mi plenuzon de la lingvo Esperanto.

DE LA REDAKTORO

Ni bonvenigos la opiniojn kaj voĉdonojn de la legantoj pri ĉi tiu afero. Sendu al: sudakruco@optusnet.com.au, aŭ perletere al Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

MELBURNO

LA UNUA SEMINARIO 2005

DE FRANCISKA TOUBALE

Sabaton la 4an de junio kuniĝis 13 esperantistoj en Ross House, strato Flinders, en la centro de Melburno, por la unua seminario de la jaro. Laŭ la nombro eblas pensi ke ĝi ne estis sukcesa, sed ĝi fakte estis tre ĝuplena.

Unue estis pritraktita serioza afero de la Viktoria Federacio, tio estis la peto de Saani Bennetts pri financa helpo por ke unu el ŝiaj lernantoj povu ankaŭ vojaĝi al Svislando kaj renkonti la korespondantojn, kiuj lernas Esperanton en La Chaux-de-Fond.



Nutraĵo estas fonto de emocioj. Tion oni povis konstati aŭskultante ĉiun ĉeestanton prezenti la pladon, kiun li/ŝi elektis por komuna tagmanĝo. Ĉiu plado memorigis la kuirinton pri emocia travivaĵo, de la gusto spertita dum infanaĝo, kia la hungara gulaŝo de Lez; la vojvodina “Grenadir Marŝ” de Svedislav; la poemoj de la pomtorto de Bernie; la kolbasoj en pastaĵo, manĝo de Betty en Londono dum la dua mondmilito; la torto de Henry, farita kiel en malnova tempo per lakto post buterigo; ĝis la karamela kremo, kies sekretan recepton Jenny sukcesis akiri de amiko ankoraŭ june for-

pasinta; la fromaĝopilketoj de Porto Rico de Alan, aŭ la tuniziaj sardinfrituloj de Franciska. Ne nur pladoj de foraj landoj estis prezentitaj, sed ankaŭ la lokaj bongustaĵoj, kia la pavlova kuko de Elrae; aŭ la vino “Four Sisters” de John. Miranda elektis tre ordinarajn biskvitojn Arnotts ĝuste pro tio ke tiu ĉiutagaĵo helpas ŝin forigi sian nostalgion kiam ŝi vojaĝas eksterlanden. Steve kunportis biskvitojn kiuj havas saman nomon kiel lia kato. Ĉiuj tiuj pladoj ne nur vojaĝigis nin tra la tempo kaj la spaco, sed ankaŭ paroligis la komencantojn same kiel la spertulojn.

Post tiu regalo ni estis pretaj aŭskulti la informojn de Miranda pri “Auslan” kaj “Signuno”, la esperanta versio de gestlingvo por surdulojn. Ni provis diveni la signifon de kelkaj gestoj aŭ memori simplajn esprimojn kiel saluton aŭ dankon. La koncizeco kaj eltrovemo de tiuj lingvoj estas tre allogaj. Sed pli ol en parola lingvo ŝajnas al mi ke paciento en la lernado necesas por ke la manoj akiru la taŭgan rapidecon.



Tiu unua seminario estis sukcesa, ĉu pro la simpleco de sia programo? Same kiel komuna kanto estas pli ol adicio de la voĉoj de ĉiuj kantistoj, la seminario estis pli ol adicio de la prezentado de ĉiu partoprenanto. □

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas kontribuojn per e-poŝto. Paperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Sendu al: sudakruco@optusnet.com.au, aŭ **PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio**.

Limdato por la septembro-oktobra numero: 15a de aŭgusto 2005

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Australia

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Marcel Leereveld | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$30 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por sudento aŭ pensiulo: \$20. Asocia membreco: \$10.

Pagu al la Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • New Zealand

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, por la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA